RATKAPTISTA KURIERO

INFORMILO DE LA RATKAPTISTA BANDO

NUMERO 17 DECEMBRO 1996

Änderung: Ratkaptista Rondo jetzt immer am **1. Freitag** im Monat, Sumpfblume, Hameln, 19.[30] Uhr.
Achtung: Am 29.11. und 6.12. fällt der Esperanto-Kurs aus. Wir treffen uns wieder zum Kurs am 20.12.

Gemütlicher Abend im Advent

Wir treffen uns am 13. Dezember (Freitag) um 19.30 Uhr im Pfannekuchenhaus

Einladung zur Jahreshauptversammlung

am Freitag, dem 3. Januar 1997
um 19.30 Uhr
in der Sumpfblume, Hameln



Tagesordnungspunkte:

1. Begrüßung
2. Jahresbericht
3. Kassenbericht
4. Neuwahlen
5. Jubiläum '97: 10 Jahre "La Ratkaptista Bando"
6. Planungen 1997
7. Verschiedenes

Im Jan./Feb.'87 gab uns Bernhard Pabst aus Bonn, der Kursleiter des Wochenend-Esperanto-Intensivkurses in Fuhlen, den Namen "La Ratkaptista Bando". Wir werden also bald 10 Jahre alt. Laßt uns überlegen, wie wir dies Jubiläum gebührend feiern können.

Kun la kristnaska rakonto el la biblio (Sankta Luko, ĉapitro 2) mi salutas vin kaj deziras al vi ĝojan kristnaskfeston kaj feliĉan novan jaron, Klaus

1 Kaj en tiuj tagoj eliris dekreto de Cezaro Aŭgusto, ke la tuta mondo estu registrita. *2* Ĉi tiu estis la unua registrado,
farita, kiam Kirenio estis reganto de Sirio. *3* Kaj ĉiuj iris, por esti registritaj, ĉiu al sia urbo. *4* Kaj Jozef ankaŭ supreni-
ris el Galileo, el la urbo Nazaret, en Judujon, al la urbo de David, kiu estas nomata Bet-Leĥem, ĉar li estis el la domo
kaj familio de David, *5* por esti registrita kun sia fianĉino Maria, kiu estis graveda. *6* Kaj dum ili estis tie, venis la tagoj
por ŝia akuŝo. *7* Kaj ŝi naskis sian unuan filon, kaj ŝi ĉirkaŭvindis lin kaj kuŝigis lin en staltrogon, ĉar ne estis loko por
ili en la gastejo. *8* Kaj en tiu sama regiono estis paŝtistoj, kiuj kamploĝis kaj nokte gardis sian gregon. *9* Kaj anĝelo de
la Eternulo alstaris apud ili, kaj la gloro de la Eternulo brilis ĉirkaŭ ili, kaj ili timis per granda timo. *10* Kaj la anĝelo
diris al ili: Ne timu; ĉar jen mi venigas al vi bonan sciigon de granda ĝojo, kiu estos al la tuta popolo: *11* ĉar hodiaŭ
estas naskita por vi , en la urbo de David, Savanto, kiu estas Kristo, la Sinjoro. *12* Kaj jen la signo por vi: vi trovos in-
faneton, ĉirkaŭvinditan kaj kuŝantan en staltrogo. *13* Kaj subite estis kun la anĝelo amaso de la ĉiela armeo, laŭdante
Dion, kaj dirante: *14* Gloro al Dio en la supera alto, Kaj sur la tero paco, inter homoj Difavoro. *15* Kaj kiam la anĝeloj
foriris de ili en la ĉielon, la paŝtistoj diris unu al alia: Ni jam iru gis Bet-Leĥem, kaj vidu ĉi tiun okazintaĵon, kiun la
Eternulo sciigis al ni. *16* Kaj rapidante, ili iris, kaj trovis Marian kaj Jozefon, kaj la infaneton kuŝantan en la staltrogo.
17 Kaj tion vidinte, ili sciigis pri la diro, kiu estis parolita al ili pri ĉi tiu infano. *18* Kaj ĉiuj aŭdintoj miris pri tio, kion
rakontis al ili la paŝtistoj. *19* Sed Maria konservis ĉiujn tiujn dirojn kaj pripensis ilin en sia koro. *20* Kaj la paŝtistoj re-
venis, glorante kaj laŭdante Dion pri ĉio, kion ili aŭdis kaj vidis, kiel estis parolite al ili.